

Vortoj, Vortaroj kaj Vortaristoj



Petro Desmet'

Vortoj, Vortaroj kaj Vortaristoj

***Eldono de Flandra
Esperanto-Ligo***

Tiu ĉi bitlibro estas senpaga versio, kun nur parto de la enhavo de la plena verko. Ĝi rajtas esti libere distribuata.

***Vortoj, Vortaroj kaj
Vortaristoj***

Petro Desmet'

1. Kaj obeante la ordonon de sia kreanto, plantido iĝis pluvarbarego

Iom da babilado pri vortaroj, temo tre kara al mi, kaj eble ankaŭ al vi kara leganto. Se vi ĉion scias pri la temo, tiam ne necesos legi ĝin! Mi verkis tiun ĉi tekston antaŭ ol la dika Krause aperis, kaj do nepre ankaŭ antaŭ ol la nova ĉefverko, la ĉina vortaro vidis taglumon.

Estis iam ...

Iam, en 1887, aperis en la mondo eta vortareto, pli ĝuste fakte kvar etaj vortaretoj, kvarnaskitoj, kies misio estis kreski kaj multiĝi por beno, bono kaj verdigo de la mondo. Estis la *Unuaj Libroj*, kaj ties aldonaj folioj. Vi scias, ke ili plenumis sian taskon malgraŭ ĉiaj logikaj duboj. Multiĝo traduka de la *Unuaj Libroj* estis malofta. Nur sveda kaj angla fratetoj montriĝis, sed la folietoj iĝis ankaŭ memstaraj kaj frate kunigis sin en *Universala Vortaro*. Ili grandiĝis, vastiĝis, firmiĝis ĝis ili atingis plenan adoltecon (pardonu min pro mia ofendbarbara malfundamenta lingvouzo) en la

glora *Fundamento de Esperanto*. Tamen, verŝajne oni ne sufiĉe serĉis, ne sufiĉe esploris pri la *Unua Libro*, ĉar antaŭ nelonge mi aŭdis pri relative frua ĉina versio! Pli ĝuste: Albault anoncis, ke li preparis libron pri ĝi: "La unuaj paŝoj de Esperanto", sed mi pensas, ke ĝi neniam aperis, kaj verŝajne, kiel tro ofte en nia verda mondo, la manuskripto perdiĝis pro lia morto, en majo 2017.

Misiistoj kaj Kaperoj ...

Krom pli-malpli fidelaj nacilingvaj tradukoj, entute ok, de la *Fundamento* jam abundis verkoj de doktaj pedagogoj, kiuj "pli funde" kaj "pli vaste" klarigis la fundamentajn bazojn kaj ekkonstruis palacojn kaj labirintojn sur tiuj fundamentoj. Pardonu, mi ne volas moki la pionirojn, ili ofte faris bonegan laboron, kaj mi eĉ ŝatas mencii kaj laŭdi De Beaufront. Pro posta mispaŝo, tre bedaŭrinda, oni ne rajtas judasigi lin tiom kiom oni kutimas. Li estis nur homo, kaj do pekema. Li estis ja verŝajne orgojla kaj mensoge honorserĉema ... sed ĉu ni nun estas tute liberaj de tia speco da homoj? (Ĉu mi faru liston?) Plej granda parto

de la satelitaj verkoj kaj vortaretoj estis benitaj de la majstro, du el la vortaretoj venis el lia plumo, la germana kaj la rusa.

Mirindaj dikaj ĝemeloj ...

Intertempe laboregis – almenaŭ tion mi pensas – du kleruloj, milojn da kilometroj unu for de la alia, super la tradukado de la franca *Le Petit Larousse Illustré*. Ĉu ili sciis unu de alia pri la laboro? Ĉu ili iel kunlaboris? Mi ne scias, sed supozas tamen minimume ... ĉar sendube ambaŭ havis kontakton kun Zamenhof, kaj plie ... ili eldonis sian verkon ĉe la sama Hachette, en sama jaro 1910. La *Vortaro de Esperanto* de Kabe ampleksas 175 paĝojn, de **abato ĝis zumi**, kaj ĝi citas en fina listo la *Enciklopedia Vortareto Esperanta*"-n de Verax, malgraŭ la diminutivo en la titolo pli ampleksa, ĉar 249-paĝa, de **abako ĝis Zuavo**. Vere, Verax estas pli scienca, do ambaŭ kompletigas unu la alian, sed tamen multegaj estas la radikoj troveblaj en unu kaj alia. Kiel deca franco, kiu respektas sin mem, Verax ne povis ne mencii francan ekvivalenton ĉe ĉiu radiko.

Ĉu do vere nur plagiata tradukado ...

En nia verda respubliko (mi prunteprenis la esprimon de Borsboom, li estu dankata kaj laŭdata) regas multe da falsa hontado. Multaj, malprave, hontas pri la maldikeco de la *Fundamento*; multaj ne ŝatas rekoni nian ŝuldecon al *Larousse*. Sed nepre estas nenio hontinda tie! La unua serioza enciklopedio en la moderna mondo, almenaŭ en nia mondo, estis *Larousse*. Do kial ĝin forpuŝi? Cetere oni ne transprenis ĝin, sed sekvis ĝin por trovi la nomindajn nociojn! Aĵoj ja ekzistas nur se la homo donis nomon al ili! Imagu, ke protektita aŭtorrajto dirus, ke oni ne rajtas libere uzi la vortojn el vortaro!

Tra la mondo blovis verda vento, ĝis malaltaj landoj ĉe la maro ...

La tutan historion detale skizi ne eblas en kelkaj paĝoj, tial ni devas limigi nin al "proksime de mia lito"-spektaklo. Antaŭ ĉio nin interesas ja la ligo inter la verda kaj nia gepatra! Jam tre frue atingis nin la vento, en tempo kiam oni ne ĉiam bone sciis kiel distingi inter

flandra, holanda kaj nederlanda (separatismo ŝajne ne estas tiel nova invento!). En 1907 jam estis la *Zakboekje van den nederlandschen Esperantist* de A. Witteryck en Bruĝo [Manlibreto de la nederlanda Esperantisto]. En 1909 aperis en la Nordo la *Woordenboek Esperanto-Hollandsch* de la Roterdama Merkurio kaj la *Woordenboek Nederlandsch-Esperanto* de Dreves Uitterdijk. Tiu ĉi lasta rimarkigas en sia enkonduko, ke estus giganta tasko enigi tipajn esprimojn de la nederlanda, kaj ke ni ankoraŭ ne sufiĉe estas pretaj por tio. Ankoraŭ kelkaj tiaj vortlistaroj aperis, sed nur en 1926 aperis la unua vortaro kun eko de mencio de esprimoj, nome en la serio *Schidlof's Zakwoordenboekjes* [Poŝvortaretoj de Schidlof]. Aŭtoro estis C.L. De Veer. *Schidlof* estis cetere la unua Esperanto-vortaro kun kiu mi mem konatiĝis, ĉar miaj gepatroj ĝin uzis. Ĝi estis la ĉarma, malgrandformata sed relative dika griza libreto! Poste Meulenhoff transprenos ĝin. Imponan verkon ni povas montri ekde 1933, kiam Thieme & Cie, en Zutphen, eldonis en treege deca formo, la *Vortarojn* de A. G. J. Van Straaten. Vortarojn, pluralo, ĉar apud la plena eldono ankaŭ aperis, poste, konciza versio ... en iomete alia

ortografio. Eĉ tiam jam embuskis nin la kameleono de la nederlanda ortografio. Estas utile mencii lian plenan nomon, ĉar por trovi informojn pri li en Vikipedio vi bezonos la plenan nomon: Antonius Gerardus Johannes van Straaten.

Al plena matureco ...

La vortaro de Van Straaten estis, kaj estas, vera trezoro. La PV nur ĵus aperis, sed Van Straaten jam plene esploris kaj uzis ĝin, kaj sendube la Proverbaro de Zamenhof neniam kuŝis tre fore de lia mano! Fizike ĝi ja estas pli impona kaj pli dika ol la posta Middelkoop kaj la postposta dika Desmet' ... sed, kompreneble, estas nur ŝajno pro la pli dika papero kaj pli grandlitera preso. Mi ne povas ne mencii, ke en nuna momento jam aperis ... nova vortaro "Esperanto-nederlanda" kiu enhavas ĉiujn vortojn de PIV.

De Plena, laŭ Pseŭdoilustrita al Ilustrita Plena ...

Surbaze de Kabe kaj Verax aperis en 1930

unua eldono de PV (*Plena Vortaro*) zorgita de Grenkamp-Kornfeld; en 1934 jam sekvita de pli kompleta dua eldono, de Grosjean-Maupin kaj Waringhien. La nombro de artikoloj ne estis multe pli granda, sed precipe la traktado de ĉiu unuopa artikolo estis pli vasta. Jam 7004 artikoloj enestis. Pri tiu historio oni povas amplekse informiĝi en la antaŭparoloj de ĉiuj PIV. Mi nepre konsilas legadon de tiu antaŭparolo, kaj mi ankaŭ instigas vin al serĉado de informoj pri Lanti, en Vikipedio. Li estis la motoro, instiganto kaj puŝanto de nia granda vortaro sed, kiel ofte gravuloj, li "antaŭis sian tempon". En 2002 aperis la *Nova Plena Ilustrita Vortaro* sed feliĉe multaj uzantoj sciigis al la aŭtoroj, ke prefere oni forigu la "nova" ... ĉar baldaŭ jam necesis "pli nova" kaj "plej nova" ... Do denove, en 2005, ĝi fariĝis simple "*PIV*". Ĉiu esperantisto devus uzi ĝin kiel specon de breviero, ne por preĝi al Lanti, sed por ekkoni ĝian nekredeblan riĉecon. Tiu riĉeco ankaŭ kuŝas en la sistemo de referencoj kaj atentigoj. Eble estus bona ideo organizi kurson pri bona uzo de PIV, ĉar tro malmulte da uzantoj malkovris la referencojn!

Niaj veraj fontoj, fontetoj, gutoj, gutetoj ...

Ofte mi aŭdas, tre ĝenite, de samideanoj eldiroj kiaj "*kato* estas vorto prenita el la nederlanda lingvo" aŭ similaĵon. Tiuj amataj, flegataj, estimataj, karaj gesamideanoj tamen bone agus se ili de tempo al tempo rigardus nian bazan etimologian vortaron la *Naŭlingva etimologia leksikono* de Louis Bastien. Jam en 1907 ĝi aperis, sed represiĝis en 1950. Stojan, en sia *Bibliografio de Internacia Lingvo*, diras, ke ĝi ne estas etimologia, sed nur paralele kompara por la nomitaj lingvoj. Mi ne akordiĝas kun li. La vera Esperanta etimologio ĝuste komenciĝas tie! Ĉio kio antaŭas jam ne estas Esperanta etimologio, sed ĝenerala etimologio. La Esperanta radiko plej ofte ĝuste surbaze de tiaj komparoj estas formita. Zamenhof ne elektis inter tiuj lingvoj, sed preskaŭ matematike difinis "plejeble komunan dividanton, plejeble komunan dividaton". Fakte, mi nun trovis, en PIV, pli taŭgan vorton: "plejofanton"! PIV instruas tage kaj nokte ĉiun uzanton!

Tutmonda Pluvarbaro ...

Pri ĉio jam dirita ni povus plenigi paĝojn,

kaj ni povus aldoni multajn informojn pri aliaj nederlandaj vortaretoj. Tamen pli bone estas foriri de la umbiliko-admiro ... Multaj el niaj homoj plendas, ke ni vivas en tempo malfavora por Esperanto, kaj ke ni ne sufiĉe progresas. Mi ne scias ĉu ili pravas aŭ ne, sed ĉiuokaze mi konstatas, ke en la lasta jardeko ekabundas la prestiĝaj vortaroj: angla, franca, germana, hispana, itala, ĉina, japana, kroata ... por mencii nur tiujn. Se ili aperas, tio normale tamen devus signifi, ke ankaŭ iu aĉetas ilin! Mi scias ekzemple, ke la hispana granda dika vortaro (laŭ aspekto tre simila al PIV) preskaŭ elvendiĝis antaŭ ol ĝi aperis. Kaj ankaŭ nia ŝatata PIV ĉe nova preso rapide per flugiloj de facila vento trovas sian vojon ... kaj estas aspirata de multaj nepagipovaj bedaŭrinduloj. Do ... ni fosu nian sulkon kaj plantu vortarojn en ĝi.

Espero

Per tiu ĉi babilado mi esperas, ke mi instigis nenederlandlingvanojn foje esplori la historion de Esperantaj vortaroj en sia nacia lingvo! La liston, verŝajne preskaŭ kompleta, ili povas

trovi en la verko de Bernardo Pabst: *Berlina Komentita Bibliografio de Vortaroj kaj Terminaroj en Esperanto 1887-2015*.

Reagoj

Zhang Xuesong (雪松): aprezis tiun ĉi artikolon.

Bernardo: Diskuteble kaj diskutinde estas, ĉu la Plena Vortaro de 1930/1934 vere baziĝas precipe sur Kabe kaj Verax, aŭ ĉu ne precipe sur la vortaro Esperanto-franca de Grosjean-Maupin, kiun mi foje – ĉu eble erare – nomis "la ĝermo, kerno kaj nukleo de Plena Vortaro (1930/1934) kaj pro tio de PIV 1970, 2002, 2005. La "avineto" de la Esperanta leksikografio".

Petro: Miskompreno! Mi NE diris, ke PIV baziĝas sur Kabe kaj Verax, sed ke tie oni povas trovi la plej fidindajn (mankajn) difinojn de la radikoj, laŭ la tiama signifo. Certe kerno estas Grosjean-Maupin, kaj ties fonto estas *Petit Larousse Illustré*. Mi ĵus kontrolis, kaj vere mi skribis surbaze de ... kaj ne menciis Grosjean-Maupin, sed mi pensas, mi

kontrolos!, ke GM ne enhavas difinojn, nur tradukojn, kaj por la difinoj, la unua PIV verŝajne baziĝis sur Kabe kaj Verax? Ĉu ne?

2. Konfeso de hontanta Vortaristo

Mi konfesas, ke mi havis la konvinkon, ke vortaroj "Esperanto-Nederlanda" ne estas utilaj aŭ almenaŭ ne estas necesaj. Bona esperantisto ja uzu PIV, ĉar difino en klariga vortaro estas pli fidinda ol nura traduko. Tamen, dum la al mi altrudita laboro super la nova vortaro mi konvertiĝis, kaj mi deziras rakonti al miaj karaj legantoj kiel kaj kial mi ŝanĝis opinionon.

Stranga kato

Kiam oni legas, en PIV, la difinon de la vorto "**kavaliero**: teraltaĵo, starigita malantaŭ remparoj de fortikaĵo, por doni pli grandan vidkapablon kaj pafeblon al artilerio" oni tuj klare komprenas pri kio temas. Sed ... se oni ne nur devas/volas kompreni sed ankaŭ traduki la vorton en la nederlandan, tiam tuj estas tute alia afero. Mi supozas, ke pere de la difino eĉ ne unu el mil nederlandlingvanoj povos liveri la ĝustan respondan nederlandan vorton. Kaj oni povas konjekti, ke vere iu nederlanda responde vorto ekzistas. Sed kiel trovi? Nu, la Esperanta-

germana vortaro de Krause instruis al mi, ke la germana vorto estas *Katze*. Tamen, eĉ plej bona vortaro germana-nederlanda ne havas tradukon de tiu *Katze*. Do, mi esploris ĉu, hazarde, ankaŭ en la nederlanda, la vorto "*kat*" havus tiun signifon, ĉar, finfine, la germana estas nur disdialektiĝo de la nederlanda, ĉu? Kaj vere, la deka signifo en *van Dale* de "*kat*" estas: (*vestingsbouw*) *verhoogd werk op de bolwerken of op de courtines van een vesting (ook als belegeringwerk)*. Sed, kiel oni devus retroviti tion sen Krause?

Ŝoto

Nia kara PIV estas iel enciklopedieca; ĝi enhavas do multajn vortojn kiujn oni ne renkontas en normalaj vortaroj. Ekzemple: "**Ŝoto**": en duondezertaj landoj, interna malaltnivela regiono, kie riveroj perdiĝas. Kiel fari por trovi la nederlandan vorton? Nu, oni tutsimple eliru de la supozo, ke la nacilingva vorto similas la Esperantan. Kaj, oni unue esploru la francan lingvon, do la *Petit Larousse Illustré*. Kompreneble oni devas adapti la ortografion, kaj oni do pensu pri *chotte*, *chôte*

ktp ... kaj vere, la vorto *chott* (jes, sen fina e!) ekzistas en la franca, kun proksimume la signifo de ŝoto en PIV. Oni tie lernas plie, ke la vorto venas de la araba *chatt*. Do en la nederlanda oni serĉu, en kiom eble plej da enciklopedioj, vortojn kiel *chotte*, *shotte*, *chot*, *shot*, *sjoot* kaj se sub tiuj vortoj nenio troviĝas oni daŭrigu al similaj vortoj kun vokalo a, kaj eventuale e, kaj finfine al sy ... En tiu ĉi okazo certe kun a, pro la etimologio. Precipe por vokaloj oni ankaŭ devas konsideri la parencajn sonojn, ĉar foje oni transskribas laŭ la sono, foje laŭ la ortografio. Kaj, jes, la granda *Winkler Prins* konas *sjott* kun la difino: nomo de salebena en Norda Afriko, kiu formiĝis ĉirkaŭ periode sekiĝanta sallago (*sebcha*), kaj ĝi citas kelkajn ekzemplojn. La vorto ne estas en *van Dale*, kaj en iu alia enciklopedio mi trovis la formon *sjot*. Kaj vere, mi konkludis, ke por helpi la karajn samideanojn vortaro "Esperanta-nederlanda" estas bezonata. Mi konfesas! Mi supozas, ke mia ĉina amiko, por produkti sian ĉinan PIV-on, devos alvoki helpon de vortaro "araba-ĉina", kaj mi do jam helpis lin survoje per la araba etimo! (Mi estu laŭdata!)

Ne ĉiu pordeto estas pordeto!

Ĉe "pordo" troviĝas "pordeto", kun la difino: malgranda pordo, ofte aranĝita en pli granda. Nu, la malgranda pordo ja estas "deurtje" ... sed ĉu ne estas speciala nomo por tia afero kiam ĝi estas aranĝita en pli granda? Jes, nepre estas, sed kiu, krom puzlemaj krucvortenigmofanatikuloj konas la vorton? Honeste mi konfesos al vi, ke mi tute hazarde, dum serĉado de alia vorto, renkontis en *van Dale* la vorton "*klinket*" kun la signifo: malgranda pordo, aranĝita en granda (ekz. urba pordego; fojneja pordego) por ke piedirantoj povu en- kaj eliri sen ke oni por tio malfermu la pordegon. Do, jen nia pordeto! Krom la traduko "deurtje" la "pordeto" do nepre ankaŭ menciu la tradukon "*klinket*". Mi esperas, ke per tiu ĉi mencio mi ne instigos al diskutoj kaj disputoj pri la bezono de nova Esperanta vorto por "*klinket*" anstataŭ la simpla "pordeto"!

Interkluzejo

Interkluzejo estas la parto de kanalo inter du kluzoj, sed kiel vi nomas ĝin en la nederlanda?

Jen pli facila enigmo, ĉar oni povas supozi, ke ĝi estos kunmetita vorto kiu komenciĝas per *kanaal*. Do, se vi trankvile esploras ĉiujn vortojn en *van Dale* kiuj komenciĝas per *kanaal* vi vere atingos kaj trovos: *kanaalpand*, kun la klara priskribo: sekcio, parto de kanalo inter du kluzoj. Se vi, poste, pro scivolo daŭrigus la serĉadon vi alvenos ĉe *kanaalvak*, kiu estas sinonimo de *kanaalpand*. Tamen jen la du solaj ĝustaj vortoj por traduki la Esperantan vorton "interkluzejo".

Ĉeflernanto

En PIV, ĉe **lerni**, troviĝas la vorto "ĉeflernanto": lernanto, aparte progresinta, elektita de la instruanto por helpi al siaj kamaradoj. Kio do? Ĉu "*hoofdleerling*"? Mi sentis, mi sciis, ke iu vorto ekzistas en la nederlanda. En tiu ĉi kazo estis la Esperanta-franca de Waringhien kiu helpis min, kiu montris al mi la vojon. La nederlanda vorto estas "*monitor*", eĉ se la komputilistoj nun protestos. Fakte *van Dale* precizigas, ke temas pri pli aĝa lernanto/lerninto, kion francaj vortaroj ne faras por "*moniteur*". La francaj

vortaroj aldonas plie, ke la ĉeflernanto povas esti, kaj ĝenerale estas, pagata por tiu servo. Francoj estas ja – estas konata fakto – pragmataj.

Pravigo de tasko

Tiaj spertoj igis min konkludi, ke por traduki iujn tekstojn, iujn vortojn, ne sufiĉas kompreni pri kio temas, sed oni nepre devas disponi pri la ĝusta vorto. Kaj mia vortaro volas esti tradukvortaro, helpilo por tradukantoj kaj tradukistoj. Mi invitas la legantojn pripensi pri la vortoj en sia propra nacia lingvo! ... kaj sperti, ke ne ĉiam estas facile trovi respondon!

Helpiloj

Por trovi la nederlandajn vortojn kelkfoje povas helpi la specialaj vortaroj por puzlemuloj, almenaŭ kiel unua ŝtupo, ĉar ili kutime nur listigas vortojn, en difinita semantika kampo, sed ne donas difinojn. Tamen ili estas utilaj nur por vortoj kiuj apartenas al tia kampo, ekzemple bestoblekoj. Se oni disponus pri serĉprogramo kiu ebligas la

inversan serĉadon, do trovi ĉiujn kapvortojn kie en la priskribo aperas iu difinita vorto, tiam oni povus pli facile trovi la serĉitaĵojn en *van Dale*. Bedaŭrinde tia programo ne ekzistas. Oni povas trovi vortojn kiuj aperas en esprimoj kaj proverboj aŭ en difino, sed ne tiujn kiuj aperas simple en iu teksto. En nia elektronika versio de la nova vortaro tiu eblo ekzistas.

Post la apero de la vortaro vendiĝis nova versio de la nederlanda *van Dale*, kaj ĉi-foje enestas, almenaŭ parte, la eblo serĉi inverse! Ĉar nun mi havas multajn alilingvajn legantojn mi ankaŭ aldonu la tradukon de la nederlanda vorto "*kat*", en tiu ĉi speciala okazo, ĉar, kiel vi sciis aŭ supozis, "*kat*" respondas al la Esperanta "*kato*". Do, la "*kat*" responda al la Esperanta kavaliere difiniĝas: (fortikaĵkonstruo) altaĵo, konstruita sur la bastionoj aŭ kurtinoj de fortikaĵo.

3. *Serpentaro*

Por prepari novan modernan eldonon de la *Fundamento de Esperanto*, en la nederlanda (kaj ankaŭ en kelkaj aliaj lingvoj) mi funde, kaj tre longe, kaj tre serioze studis la *Fundamenton*. Fakte mi malkovris sufiĉe da aferoj.

Kio kaŝiĝas sub la herbo?

Tre multon oni povas lerni per serioza studado de la *Fundamento*. Ankaŭ mi spertis tion, kiam mi preparis la novan nederlandan version, kaj pristudis la malnovan nederlandan version apud la seslingva. Tiel mi konstatis, ekzemple, ke iu antaŭulo tradukis per sama vorto tri el la kvar serpentoj el la *Fundamento*. Li tradukas: aspido, kolubro kaj vipuro per unusola sama vorto: *adder* (= vipuro fakte nur!). Kompreneble tio estis neakceptebla simpligo ... eble kaŭzita de neinteresiĝo de la tradukinto por la naturo? Sed, en tiu maniero li fakte deklaris Zamenhofon nelogikulo, ĉar kial iu enmetus tri fojojn la sama besto kun alia nomo ... en lingvo(n) kiu deziras havi kiom eble

plej malmulte da radikoj?

Fundamenta serpentaro

Fakte estas kvin serpentoj en la *Fundamento* (multe ĉu, kompare al aliaj bestoj!): serpento, aspido, kolubro, vipuro kaj boao. Mi pensas, ke la rezonado de Zamenhof estis – ni ne plu povas demandi lin! – havi unu ĝeneralan vorton: **serpento** ... kaj havi la eblon distingi inter venenaj, nevenenaj kaj strangolaj serpentoj. En la nederlanda estas uzata la vorto "*gif(t)slang*" (= venenserpento) kaj mi pensas, ke multaj lingvoj posedas tian vorton, tre ĝeneralan, kaj tamen tre distingan kaj gravan. Kaj la vortaro de Kabe ŝajnas konfirmi mian supozon! Kio estas la graveco de tiu vortaro? Nu, ĝi datas el la sama tempo de la *Fundamento* (Fund.: 1905; Kabe: 1910) kaj estas preskaŭ certe, ke Zamenhof legis ĝin kaj aprobis ĝin antaŭ publikigo. Mi kopias por vi la difinojn de Kabe:

Aspido: (Zool.). Venena serpento.

Boao: 1. Grandega serpento. (kiel duan difinon li mencias: peco de pelto, portata ĉirkaŭ

la kolo).

Kolubro: (Zool.). Speco de nedanĝera serpento (*Coluber*).

Vipuro: (Zool.). Speco de venena serpento (*Vipera*).

Serpento: (Zool.) Rampulo kun tre longa, cilindroforma korpo, kovrita de skvamoj, sen piedoj.

Tute klare: la ĝenerala vorto estas serpento, ĉar ĝi estas uzata en la aliaj difinoj! Al serpento ne respondas, ĉe Kabe, latina nomo! Ĝenerale Kabe metas la latinan nomon ĉe ĉiuj bestoj kaj plantoj.

Li ne faris ĉe Aspido ... mi supozas ĉar li deziris, ke oni uzu "aspido" por ĉiu venena serpento (krom por vipuro ... sed ... tiu vipuro ja ne de ĉiu estas konsiderata "serpento"!). Ankaŭ ne ĉe Boao; ĉu do ĉiu grandega serpento estu boao?

PIV-aj konsideroj

En PIV ĉe **aspido** estas duobla difino. Laŭ la unua temas pri specio: *Naja haje* ... kaj laŭ la ekzemploj estis tia serpento kiu mortigis Kleopatron. En la nederlanda mi ĉiam lernis, ke ŝi mortis pro mordo de vipuro! *Larousse* instruas, ke estis aspido; sed ĉe aspido ĝi diras, ke aspido estas vipuro. Laŭ la dua difino: nomo de diversaj venenaj serpentoj. Kolubro en PIV estas ankaŭ iu grupo da serpentoj, sed ĉiuj parencaj al *Coluber*. Vipuro aŭ vipero (mi supozas, ke vi konas la tutan historion?) estas reptilio (*Vipera*) el la subordo de serpentoj ... La difino de serpento estas ankaŭ tre ĝenerala. Nu, kaj kial Zamenhof enmetis la fifaman vipuron? Mi supozas ... por montri ke, se vi deziras paroli pri iu specifa speco da bestoj ... vi bezonas nomon por ĝi.

Praserpentoj

Alia, laŭ mi interesa, demando: Kaj el la kvin, kiu(j) estis en la prafundamento? Mi nomas prafundamento: la Unua(j)n Libro(j)n. Nu, pripensu ... kaj vi konas la respondon! ... jes, kompreneble, nur la **serpento** estas!

Por plifaciligi la studadon kaj pripensadon

de tiaj aferoj ... mi preparas tutesperantan fundamenton, en kiu mi en la U.V. metos la difinojn de Kabe (kun aldonaj notoj kie utila!), kaj en kiu mi per signo indikos la prafundamentajn fundamentajn vortojn (tiuj, kiuj jam aperis en la *Unua Libro* do).

Kion faris Rosa Junck (tradukantino de la *Fundamento* en la italan) kun la kvar serpentoj? Tre interesus min ekscii ĉar ŝia *Fundamento* aperis antaŭ ol Kabe aperis!

Serpentumado

Kaj kiom da serpentoj en PIV? La vorto aperas 136 fojojn. Entute estas ĉirkaŭ 22 nomoj de serpentoj: anakondo, aspido, bazilisko, boao, botropo, bungaro (aŭ kraĵto), cerasto, elapo, hidro, kobro, kolubro, koralserpento, koronelo, krotalo (= sonserpento), marserpento, meluzino, najo, pitono, serpento, sufokserpento, venenserpento kaj vipero/vipuro. Malmulte? Kiom da nomoj de serpentoj vi konas en via lingvo? Ĉirkaŭ? Nu jes, ĉar ĉu mi kalkulu aparte la sinonimojn? ĉu mi ankaŭ enigu la dupartajn nomojn (adjektivo + substantivo; ekz. Hindia kobro; Egiptia kobro)? ĉu mi kalkulu pli

ĝeneralajn nomojn (ekz. kraĉkobro)? Kaj kio pri la fabelaj serpentoj (bazislisko, hidro, meluzino)?

Nociokampo

Precizeco? Malprecizeco? La malprecizeco en *Fundamento* estas necesa kaj estas kvalito! Kaj oni ne povas tiel ĝeneralige konkludi! Ekzemple: la Esperanta vorto **kato** estas pli preciza ol la respondaj vortoj en naciaj lingvoj! En ĉiuj naciaj lingvoj la responda vorto havas multe pli da signifoj ol la Esperanta (laŭ PIV) kaj ... en PIV la uzo de **raŭpokato** por *gatto delle nevi* en Minnaja nepre estas kritikebla! Cetere ... tiu itala uzo de *gatto* venas, verŝajne, de la literoj CAT sur la maŝino de Caterpillar, kiel en multaj aliaj naciaj lingvoj!

4. De lingvo al lingvo ...

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

5. *Ĝuu kun mi!*

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

6. Ŝatata Venĝilo de Putinistoj

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

7. Jubile, Jubilade, Gargantuece Palatkareseme

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

8. Neologismologio

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

9. Neologismologio 2

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

10. Fazeoloj puraj kaj en dolĉlaktosaŭco

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

11. Pendanta Pedantulo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

12. Rakonto pri kelkaj agrablaj kulturkoloraj renkontiĝoj

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

13. Pri pliaj tegmentuloj ...

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

14. Kiel ŝafo foje kondukas ŝafiston!

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

15. Kata Logo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

16. Dek-sepa regulo de la Fundamenta Gramatiko

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

17. Tagmeza Paŭzo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

18. Konsultante orientajn brevierojn ...

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

19. Pri traboj kaj ŝtipoj

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

20. Universala Flano Abunda

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

21. Antaŭferia Ĝojo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

22. Aldone al antaŭa teksteto

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

23. Eĉ sub simpla frazeto foje kaŝas sin vipero!

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

24. Vortoj en vortaro

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

25. Defioj de vortaristoj

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

Listo de traktitaj proverboj kaj esprimoj

<

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provlibro.

Verkoj de la sama aŭtoro

Artikolaroj:

- [Esperanto kaj kulturo](#)
- [Proverboj sub lupeo](#)
- [Vortarludoj](#)

Vortaroj:

- [Bildvortaro en Esperanto](#)
- [Nederlands-Esperanto-Nederlands
Woordenboek](#)
- [Esprimaro - Promenoj en Edeno](#)
- [Zakwoordenboekje Poŝvortareto](#)
- [Vasta vortaro/Uitgebreid woordenboek
Esperanto-Nederlands](#)

Kolofono

Titolo: Vortoj, Vortaroj kaj Vortaristoj

Aŭtoro: Petro Desmet'

Kovrilo: Horia Varlan

UDK: 18.98

NUR: 627

IBAN: 17-11-304-392

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekenstraat 169 - 2060 Antwerpen

www.retbutiko.be

© 2020 FEL, Antverpeno